RADIO HABANA CUBA
Artículo Editado por Maritza Gutiérrez González
25/10/2018 17:46:40

Díaz-Canel denuncas novan politikan manovron kontraŭ Kubo.

Havano, 25 okt (RHK) La kuba prezidento Miguel Díaz-canel denuncis ke la administracio de Donald Trump ekigis novan politikan manovron propagandcelan kontraŭ Kubo.

Per sia socia retkonto en Twitter @DiazCanelB, la prezidento skribis ke la celo de la usona registaro estas manipuli la publikan opinion, al la ŝtatoj kaj malfortigi la subtenon de la internacia komunumo al la kuba rezolucio kontraŭ la krima ekonomia sieĝo kiu daŭras preskaŭ ses jardekoj.

La venontan 31-an de oktobro, por la 27-a fojo, okazos la voĉdonado en la Ĝenerala Asembleo de UN kontraŭ la usona blokado al la insulo.

Lastfoje, en 2017, la rezolucio proponata de Kubo estis subtenata de 191 landoj el 193 kiuj membras en UN. Nur Usono kaj ties firma aliancito Israelo, voĉdonis kontraŭ.